

Georges Galichet kaj esperanto
Claude Gacond, 209-a radioprelego, 1967.10.11 & 1967.10.14

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtundan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La [*Eseo pri psikologia gramatiko*] *Essai de grammaire psychologique* publikigita de **Georges Galichet** en 1947 revoluciis la lingvo-instruadon kaj la interlingvistikajn studojn. Tiu ducentpaĝa volumo devigis jam multajn homojn ŝanĝi sian vidpunkton pri la lingva mekanismo. Ĝi devigos ankoraŭ multajn aliajn revizii antaŭjuĝojn.

A.- Por la esperantistoj tiu libro alportas multon. Pro tio mi instigas ĉiujn esperanto-instruistojn, kiuj legas la francan, ĝin atente trastudi. La legado de tiu eseo kondukos ilin al fruktigaj meditadoj pri la lingvaj fenomenoj.

Cl.- Georges Galichet imagis grafikajn simbolojn, kiuj ege faciligas la gramatikan analizon. Io notindas : Tio estas, ke ekzistas absoluta paralelismo inter tiuj simboloj kaj la gramatikaj finaĵoj aŭ markoj de esperanto. Tiu fakto estas rimarkinda kaj tre grava.

A.- Ekzistas 10 simboloj. Jen ili kun la esperantaj korespondadoj :

Cl.- Cirklo simbolas la verbon. Esperanto : markoj **i, as, is, os, us** kaj **u**.

A.- Kvadrato simbolas la substantivon. Esperanto : marko **o**.

Cl.- Triangulo simbolas la adjektivon. Esperanto : marko **a**.

A.- Speco de kvadrata satelito rememoriganta la substantivon simbolas la artikolon. Esperanto : **la**.

Cl.- Speco de cirkla satelito rememoriganta la verbon simbolas la konjugacian pronomon : Esperanto : **mi, ci, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili, oni**.

A.- Duoncirklo simbolas la adverbon. Esperanto : marko **e** aŭ **nenia marko**.

Cl.- Eta kvadrato simbolas la pronomon. Esperanto : temas pri korelativoj kiel **iu, kiu, tiu, ĉiu, neniue, io, kio, tio, ĉio, nenio** kaj kelkaj facile listigeblaj vortoj.

A.- Restas tri simboloj, kiuj reprezentas la kroĉilojn : kroĉileto simbolas la prepoziciojn ; kroĉilego la subordigajn konjunkciojn ; kaj streko la kunordigajn konjunkciojn. Esperanto : **nenia marko**.

Cl.- La granda merito de Georges Galichet estas, ke per tiuj 10 simboloj li kapablas analizi ĉiujn eblajn francajn frazojn. Tiel li demonstras, ke fakte la lingva mekaniko estas tre simpla. Ĝis nun kvazaŭ nur la esperantistoj ricevis tiun impreson. Ni prenu ekzemplon :

A.- La frazo : ***En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron***, kiu povus simboliĝi tiel en esperanto : **je la o o is la o kaj la o**. Per la simbolaro de Galichet tio fariĝas : prepozicia kroĉilo, kvadrata satelito, kvadrato, kvadrato, cirklo, kvadrata satelito, kvadrato, kunordiga konjunkcia kroĉilo, kvadrata satelito, kvadrato. Tiu simbolaro fakte estas legata : prepozicio, artikolo, substantivo, substantivo, verbo, artikolo, substantivo, kunordiga konjunkcio, artikolo, substantivo.

Cl.- Vi certe rimarkis parencecon inter la simbolaro de Galichet kaj la gramatika strukturo de esperanto. Por Galichet tiuj simboloj estas pedagogia rimedo. Por Zamenhof ankaŭ : ĝi ebligas al iu ajn homo apartenanta al iu ajn nacia lingvo akiri racian pensadon, sin liberigi de la nacia penskutimo kaj fine sin senti hejme en la lingvo internacia. Por Zamenhof esperanto estas internacia per tiu gramatika strukturo, kiu respegulas la lingvo-fenomenon mem. La

Georges Galichet kaj esperanto
Claude Gacond, 209-a radioprelego, 1967.10.11 & 1967.10.14

komparado kun la simbolaro de Galichet alportas pruvon, ke Zamenhof ne trudis al sia lingvo artekreitan gramatikon.

A.- La simbolaro de Galichet estas mirinda enkonduko al la studo de esperanto. Analizo de tuta teksto en la nacia lingvo per la grafikaj simboloj permesas fari multajn malkovrojn. La francoj ekzemple malkovrus ke :

Cl.- *Je suis venu, j'ai vu, j'ai vaincu,*

A.- kiu tradukiĝas per : *Mi venis, mi vidis, mi venkis*, estas la ripetado de nur du simboloj : konjugacia pronomo, verbo, dum la francoj, kiuj ne havas klaran supervidon pri la lingva fenomeno, ofte kredas, ke temas pri pronomo plus du verboj, el tio en esperanto ilia tipa eraro :

Cl.- *Mi estas veni, mi havas vidi, mi havas venki.*

A.- Tiu simbolaro permesas ankaŭ demonstri, ke oni povas esprimi la saman ideon laŭ du eblecoj. En unu frazo la verbo estas la ĉefa elemento. En la alia la substantivo. Jen ekzemplo en esperanto :

Cl.- *Li marŝas rapide. Lia marŝo estas rapida.*

A.- Tio simboliĝas en esperanto per :

Cl.- **li as e; li+a o as a.**

A.- Tiam estas facile multigi la ekzemplojn:

Cl.- Li kuras lante. Lia kuro estas lanta.
Li kantas bele. Lia kanto estas bela.
Li laboras precize. Lia laboro estas preciza.
Li studas inteligente. Lia studo estas inteligenta.

A.- Kaj tiel plu. Se tio ŝajnas facila en esperanto, la sama laboro signifas malfacilan gimnastikon en nacia lingvo. Jen en la franca :

Cl.- Il marche vite. Sa marche est rapide.
Il court lentement. Sa course est lente.
Il chante bien. Son chant est beau.
Il travaille avec précision. Son travail est précis.
Il étudie intelligemment. Ses études sont menées avec intelligence.

A.- En la konkludo al sia eseo pri psikologia gramatiko Georges Galichet diras verojn, kiuj ne nur taŭgas por lia metodologio, sed ankaŭ konvenas al esperanto. Aŭdu etan ekzemplon :

Cl.- « *Oni tro longe faris de la gramatika analizo vanan kaj artefaritan gimnastikon, kie memoro anstataŭas inteligentecon, kie regas aŭtomateco. Kiel ni ĝin vidas, gramatika analizo estas pensado de la spirito pri si mem kaj pri la Mondo, alĝustigo de la penso al la psikologiaj fundamentaj kadroj, rigora komparado de la ideoj kaj de ties esprimiĝo.* »

A.- Esperantistoj povus diri :

Cl.- « *Oni tro longe faris de la gramatika analizo vanan kaj artefaritan gimnastikon, kie memoro anstataŭas inteligentecon, kie regas aŭtomateco. Kiel esperanto ĝin vidigas, gramatika analizo estas pensado de la spirito pri si mem kaj pri la Mondo, alĝustigo de la penso al la psikologiaj fundamentaj kadroj, rigora komparado de la ideoj kaj de ties esprimiĝo.* »

Georges Galichet kaj esperanto
Claude Gacond, 209-a radioprelego, 1967.10.11 & 1967.10.14

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando.

Cl.- Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-